

Heinrich Heine,
Libro de la kantoj, Lirika intermezo, VI

tradukita de Manfred Retzlaff

Alpremu la vangon al mia vang',
Ke niaj larmoj kuniĝu,
Kaj vian koron al mia kor',
Ke l' flamoj unuiĝu.²

Se en la flamon enverŝas sin
De niaj larmoj fluo
Kaj se mi tre firme brakumas vin,
Mi mortos pro am-ĝuo.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Lyrisches Intermezzo, VI" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984-02-24.*

MR-145-1 / Arg-716-1439 (2012-12-09 14:29:05)

²aŭ:

Alpremu la vangon al mia vang',
Ke niaj larmoj kunfluu
Kaj vian koron al mia kor',
Ke niaj flamoj unuu.